



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 2
1971


ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
37-a (42-a) jaro
Monata

La 42-a Norvega Esperanto- Kongreso

NEL 60-JARA

TRONDHEIM
estas ĉi-jare elektita
kiel loko de la
42a Norvega
Esperanto-Kongreso
de NEL. La kongreso
okazos dum la
pentekostaj tagoj de la
30a ĝis la 31a de majo
1971.



Bonvenon al Trondheim!



Lars Kåre Hunnes,
prez. de Grupo Esperantista de Trond-
heim kaj de Meza Distrikto de NEL.

Trondheim fondiĝis en la jaro 997 de la vikingreĝo Olav Trygvason. En la Mezepoko ĝi estis la ĉefurbo kaj la eklezia centro de Norvegujo. Hodiaŭ ĝi estas universitata urbo kaj centro de Meza Norvegujo. Cetere Trondheim estas la dua plejgranda urbo de Norvegujo kun 127.500 enloĝantoj.

Karakterizaj trajtoj de la urbo estas la larĝaj stratoj, la pitoreskaj kvartaloj, la malnovaj lignodomoj kaj la modernaj grandmagazenoj.

Trondheim estas unu el la ĉefaj turistcentroj de Norvegujo kun la Katedralo kiel la plej granda vidindaĵo. En la urbo troviĝas pli ol 1400 hotelloj, kaj la hoteloj estas ĉiuj altklasaj. Plue la restoracioj de Trondheim estas bone konataj pro ilia agrabla atmosfero.

De Trondheim eliras kvar fervojlinioj, kaj la marbordaj ekspres-ŝipoj ĉiutage vizitas la urbon. Aervoje Trondheim havas plurajn komunikojn potage kun Norda, Suda kaj Okcidenta Norvegujo.

En la jaro 1904 Esperanto venis al Trondheim, kaj jam en 1907 Grupo Esperantista de Trondheim fondiĝis. GET tri fojojn antaŭe aranĝis la jarkunvenojn de NEL. Tio okazis en 1937, 1949 kaj 1959, kaj nun GET denove invitas la esperantistaron al la 42a Norvega Esperanto-Kongreso dum la pentekosto 1971.

Ĉi tiu kongreso estas ne nur ordinara kongreso, sed ankaŭ jubilea, ĉar NEL ĉi-jare estas 60-jara. Do, venu multnombre por partopreni la jubileon de NEL! Ni kore bonvenigas vin!

Lars Kåre Hunnes.

*

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach.

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B,
N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por
manuskriptoj: la 20. en la monato
antaŭ la apero.

Abonprezo: En Norvegujo kaj ekster-
lando: n.kr. 12,—.

Anoncprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—,
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 40,—,
1/8 p. kr. 20,—.

Via Ŝanco

Vi scias pri nia poŝtmarkkolekto. Ĉu vi konas iun, kiu deĵoras en granda firmao? Se jes, demandu, ĉu li povas havigi al vi poŝtmarkojn. Kelkaj firmaoj havas grandan korespondadon kun eksterlando — ofte pezaj leteroj kun valoraj pm.

Diru al la firmestroj, ke lia firmao estos menciita en Norvega Esperantisto — tute senpage — se li havigos al vi tiujn pm.

Menciu samtempe ankaŭ, ke oni povas anonci en nia gazeto.

Se vi povas nenion alian fari por Esperanto — jen via ŝanco!

*

La kontorfondajo

O. Rygg	kr. 100,00
W. Hortman	» 15,00
R. Berli	» 25,00
G. Ringstad	» 10,00
C. S. B.	» 10,00

		kr. 160,00

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj!

SUBTENANTAJ MEMBROJ

W. Hortman
Erling Antoni Utne.

Sciigoj de N.E.L.

Norvega Esperantisto kaj la kotizo. Ĉiujare kelkaj membroj pagas sian kotizon nur tre malfrue en la jaro, ofte nur post pluraj urĝigoj, sed ni sendadis al ili la gazeton sen interrompo. Okazas ke iuj tute ne pagas, kaj do ricevas la gazeton dum la tuta jaro senpage. La Estraro trovis ke tio ne povos plu daŭri. Oni tial decidis haltigi la gazeton al nepagintaj membroj, klubaj kaj rektaj, post n.ro 3. Kiam ni ricevos poste kotizon, ni postsendos la numerojn, kiujn la koncerna membro ne ricevis. Sed ĉar estas maloportune ricevi kelkajn malnovajn numerojn kune, estas konsilinde pagi la kotizon frue, kiel postulas la statuto. Tio ankaŭ ŝparas al ni multe da laboro.

Taskotabelo por kluboj. — Marto: Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La kasisto sendas poŝtan enkasigilon al la membroj, kiuj ankoraŭ ne pagis la kotizon.

La Liga Estraro.

EKZAMENOJ

EKZAMENOJ

Supera ekzameno en decembro 1970.

Rerakontaĵo.

Fumo venis el la buŝo de la edzo.

Iom post la trovo de Ameriko la maristo *Rodrigo de Jerez* (Heres) revenis de la nova mondo. Li iĝis malpli parolema ol antaŭe, kaj lia edzino multe pensis pri tio. Ŝi fariĝis suspektema pri la stranga konduto de la edzo, ĉar li tre ofte, kaj precipe post la manĝoj, enŝlosis sin en sia ĉambro. Ŝi provis eltrovi, kion li faras, sed sen sukceso, ĉar li ja ĉiam ŝlosis la pordon. Sed la scivolemo de la edzino kreskis de tago al tago. Fine ŝi elpensis metodon. Ŝi faris trueton en la pordo, tra kiu ŝi povis rigardeti en la ĉambro de la edzo.

Kaj kion ŝi vidis? Rodrigo kuŝis senmove sur la lito kaj fumis pipon, kiel li lernis de la indiĝenoj en la nove trovita Ameriko. Ŝi tre terurigis, ĉar ŝi kredis, ke Rodrigo estas *obsedita* de la diablo. Ŝi vidis, ke nubetoj de fumo venas el lia buŝo, kaj tiel ne okazas ĉe normalaj homoj.

Tiel, oni diras, komenciĝis la uzo de la tabako en Eŭropo. Kaj tiu fumo, kiu estis kovronta la tutan kontinenton, teruris ne nur tiun ĉi bonan virinon, sed eĉ hodiaŭ la fumado kaŭzas zorgojn precipe al la kuracistoj.

Klarigoj: Nomo: Rodrigo de Jerez (elparolu Heres)

Obsedi = prem-okupi la spiriton (ĉi tie: «la diablo prenis lin») (Por orientiĝo: La rakonto enhavas proksimume 200 vortojn)

EKSTERORDINARA EKZAMENO

Nia ekzamena regularo celas nur norvegojn, sed tamen en kelkaj okazoj eksterlandanoj faris ekzamenojn ĉe nia komisiono. Ili sufiĉe bone sciis la norvegan lingvon por fari la tradukajn taskojn, skribe el la norvega en Esperanton kaj buŝe el Esperanta libro en la norvegan.

Sed en la lasta aŭtuno japanino deziris fari la superan ekzamenon ne sciante sufiĉe la norvegan lingvon por fari tradukojn.

La ekzamena komisiono volis solvi ĉi tiun taskon. Komprenoble ni devis trovi sufiĉe bonajn anstataŭajn metodojn.

Unue ni decidis, ke la skriba traduka tasko estu anstataŭe rerakontaĵo, ĝuste kiel oni praktikas en la lernejoj. (La originalan tekston vi trovas ĉi tie.)

Pli grandan embarason kaŭzis la buŝa parto de la ekzameno, ĉar la kandidato ja ne povis traduki en alian lingvon ol la japanan, kaj neniu el nia komisiono ja scias la japanan!

Unu el la libroj prezentitaj por la ekzameno estis «Pasko» de Strindberg. La kandidato devis unue legi kelkajn sufiĉe longajn replikojn el la dramo (p. 31—32), en kiuj estis sufiĉe da enhavo, iom

pli ol unu paĝo. Tiuj ĉi replikoj iamaniere enhavas kernon de la dramo. La kandidato povis por si mem relegi la legitaĵon unufoje, kaj poste per propraj vortoj rakontoj la enhavon. Post tio ni demandis pri la enhavo de la legitaĵo, pri la kaŝitaj sencoj de la frazoj, kiel ili aludas al aliaj partoj de la dramo kaj al la vivo de la aŭtoro. Tiel ekzamenante, ni povis kontroli, ke ŝi vere komprenis la tekston.

Krom tio la kandidato devis legi pecon el nekonata libro. La teksto estis ĉina fabelo. Traduki ŝi ja ne povis. Sed per siaj propraj vortoj ŝi rerakontis la enhavon, kaj per diversaj demandoj ni kontrolis, ke ŝi ĝuste komprenis ĝin.

Pri la gramatiko ni ekzamenis per Esperanto.

Por ni en la komisiono ĉi tiu ekzameno estis interesa eksperimento, kaj la spertojn ni konservos ĝis alia fojo.

por la
Ekzamena Komisiono de N.E.L.
O. Rygg, sekr.

INFORMOJ DE LA EKZAMENA KOMISIONO

Ekzameno plenumita. Dum Decembro 1970 superan ekzamenon sukcese plenumis en Oslo Tamiko Kaŭakami.

Ordinaraj printempaj ekzamenoj. Ekzamenoj okazos ĉirkaŭ la 1-a de Juni 1971. Instruistanoj ekzamenon oni povos fari en Oslo, superan kaj elementan ekzamenojn en Oslo, Bergen, Haugesund, Sarpsborg, Sauda, Tromsø kaj

Trondhejmo. Oni anoncu sin per la presitaj skemoj riceveblaj de la ekzamenaj komitatoj aŭ rekte de la Ekzamena Komisiono. Oni sendu la skemojn al til komitato, ĉe kiu oni intencas fari la ekzamenon, *antaŭ la 1-a de Majo*. Personoj, kiuj faros la ekzamenon ne en Oslo, plenigu po 2 — du — skemojn. *Plenigu la skemojn precize kaj komplete!* — *Aligoj, kiuj alvenos post la 1-a de Majo, ne estos konsiderataj.*

Ekzamenoj dum la Landa Kongreso. La Landa Kongreso okazos en Trondhejmo 29.—31. Majo. Kandidatoj, kiuj deziras fari la

Daŭr. p. 23

HELSINGØR

40-jara feria kursaranĝo

La internaciaj feriaj Esp-kursoj de Helsingør okazos 25/7—1/8 en La Internacia Altlernejo (tute moderna). Venu al Danlando por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo kaj por partopreni nian 40-jaran jubilean aranĝon. Prospekto senpage havebla ĉe


L. FRIIS
Ingemannsvej 9,
DK - 8230 Åbyhøj, Danlando.

N.B. Aŭtunaj feriaj Esp-kursoj okazos en la altlernejo JUNAJ HEJMO ĉe Århus, Danlando, 17.-23.10. 1971. Programo baldaŭ havebla ĉe L. Friis.

FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO — NEFA

Kaldbakkstubben 22, Oslo 9
Redaktoro: Odd Kolbrek,



lom pri la fervojlinioj en Norvegio

Trans la tegmento de Norvegio

LA BERGENLINIO — 470 km longa — inaŭguriĝis de reĝo Håkon VII la 1an de decembro 1909, kaj ankaŭ hodiaŭ ĝi estas la sola, stabila tutjara komunikilo inter la orienta kaj la okcidenta suda Norvegujo. Dum kelkhora agrabla vojaĝo okcidenten vi trapasas vastajn arbar-regionojn kun briletantaj lagoj kaj akvofaloj, la malvastaj valo, kie montarmasivoj situas kvazaŭ ili barus la daŭrigan vojaĝon, trans la nudeca altmontarstepo kun glaciejoj kaj eterna neĝo kie preskaŭ ĉiam blovas. Poste daŭrigas la vojaĝo malsupren al la maro tra tipe okcident-norvega naturo kun profundaj, malvastaj fjordoj kaj neĝkovritaj montpintoj kiel fono por abundaj fruktĝardenoj.

Proksimume 300 km de Oslo aŭ post preskaŭ 5-hora vojaĝo vi venas al Finse, kaj tute poste pasas la plej altsituantan punkton de la Bergenlinio Taŭgevatn, 1301 m.s.l.m. (Vojaĝante orienten de Bergen vi preterpasas Taugevatn post proksimume 3-hora vojaĝo.) Ĉi tiu alteco eble ne imponas, sed memoru, ke Norvegujo estas lando en najbareco de la artikaj regionoj, kaj okcidenten de la stacio Ustaoset laŭ proksimume 100 km longa distanco la linio kondukas super la arblimo trans nudeca, dezerta montarstepo, kie eĉ ne unu arbo ŝirmas kontraŭ

la vento. Parenteze, la tasko de la multaj ŝirmiloj kaj lignotuneloj, kiuj eble ŝajnas al vi ĝenaj, ĉar ili baras la elvidaĵon, estas gardi la fervojlinion kontraŭ la neĝo, ili necesas, por ke la trajnoj veturu en sekureco tage kaj nokte dum la tuta jaro. Estas ja la neĝo, kiu estas la plej timiga malamiko de la linio, kaj de Finse kiu estas la ĉefkvartiero de la neĝforigado, oni batalas kontraŭ la neĝo preskaŭ dum la tuta jaro. Tio ne signifas, ke neĝas dum la somero, sed tiam la traktaboristoj estas okupitaj laŭlonge de la linio por ripari la ŝirmilojn kaj la lignotunelojn post la atakoj de la vintroŝtormoj. Tutcerte la plej impona kaj surpriziga elvidaĵo, kiun oni travivas dum la tuta vojaĝo per la Bergenlinio, oni havas proksime de Myrdal, kie oni tra truoj en la tunelmuro ekvidas plurcentmetran distancon malsupren en la valon Flåmsdalen, grandega fendo inter verd-grizblankaj montkolosoj. Laŭ ĉi tiu malvasta kaj sovaĝa valo iras la 20 km longa Flåmlinio, kiel flankelinio, de Myrdal malsupren al Flåm ĉe la Aŭrlandsfjordo, brako de la plej longa fjordo de Norvegio, Sognefjord. La Flåmlinio estas nekredebla linio, de Myrdal 867 m.s.l.m., malsupren al Flåm 2 m.s.l.m., daŭras la vojaĝo nur 53 minutojn. La linio ankaŭ havas la plej grandan ascendon el ĉiuj norvegaj fervojlinioj, nome 55 ‰.

La Bergenlinio kondukas tra proksimume 200 tuneloj kaj tra 28 km da

lignotuneloj, kaj transpasas 300 pontojn. Post kiam la tuta Bergenlinio estis elektrigita en decembro 1964, la vojaĝo inter Oslo kaj Bergen nun daŭras iom pli ol 8 horojn, sed certe valoras oferi unu tagon al ĉi tiu brilega kolorfilmo de la realeco kun akvofaloj, montaroj kaj valoj kiuj aperas laŭ la linio.

Mi kolektas poŝtkartojn kaj amatorfotojn pri norvegaj stacidomoj —, en koloraj kaj nigreblankaj, malnovaj kaj novaj.

Per Johan Krogstic, 2340 Løten

Daŭr. de p. 21

Ekzamenoj ...

elementan aŭ superan ekzamenon dum la Landa Kongreso, anoncu sin per la presita skemo (vidu supre), rekte al la Ekzamena Komisiono antaŭ la 29a de Aprilo.

NB! Nur personoj loĝantaj en lokoj, kie ne troviĝas loka ekzamena komitato, povos fari ekzamenon dum la Landa Kongreso.

Adresoj de la lokaj ekzamenaj komitatoj:

OSLO: Ekzamena Komisiono,
Boks 942, Oslo 1. Poŝtĝirokonto
100.34.

BERGEN: S.ro Kjell Offerdal,
Sv. Hjetlands vei 6 B,
5031 LAKSEVÅG.

HAUGESUND: S.ro Olav Thor-
modsen, Boks 59,
5501 HAUGESUND.

SARPSBORG: S.ro Johan Ham-
mond Rosbach, Huldervn. 17 B,
1700 SARPSBORG.

SAUDA: S.ino Elna Matland,
Brekkevn. 50, 4200 SAUDA.

TROMSØ: S.ro Arne Høgseth,
Høgstua, Postboks 1025,
9020 TROMSDALEN.

TRONDHEJMO: S.ro Birger
Nordstrand, Nonnegt. 19,
7000 TRONDHEJMO.

Ekzamena Komisiono de N.E.L.
C. Stop-Bowitz
prezidanto.

Ekonomie ...

PM

En Esperantaj anoncoj «pm» signifas «poŝtmarkoj». Norvega Esperantisto kolektas pm por fortigisian ekonomion. De tempo al tempo alvenas mendoj kaj kolektitaj pm. Dankon! Anstataŭ donaci monsumon por via gazeto, aĉetu saketojn da pm. En kelkaj saketoj estas ŝanco pri premio.

TURKAJ

Aldone al la varoj anoncitaj en nro 1/1971 ni povas nun oferti tre belajn turkajn pm.

KLUBOJ

Klubo, aĉetu saketojn. Disvenu en viaj kunvenoj. Sperto montras, ke la saketoj estas tre facile vendebaj. Ili kostas po 2 kr. — tio donos minimume 1 kr. en la kaso. Mendu kvanton el nia granda stoko.

BILDMARKOJ

Ni memorigas pri la ebleco por aĉeti bildmarkojn. Legu en la pasinta numero. Fariĝu aktiva, ankaŭ vi!

La laborplano de N. E. L.

(Daŭrigo)

Ĉapitro V temas pri Lingvo. Ĝi havas kvar punktojn:

1. «Plimultigo de kursoj kaj studrondoj. Elektro de speciala organo, kiu priatentu aranĝadon de Esperanta instruado.» Tio ĉi estas eble la plej grava punkto de la tuta laborplano, kaj ĝi estas ja terure neglektata. Sen kursoj ni ne kreas novajn esperantistojn, la fidelaj maljunuloj iom post iom mortas, kaj la membraro malkreskas. Ĉiu serioza klubo, ĉiu unuopa membro, devas klopodi por starigo de kursoj. Se oni sukcesas kolekti nur malmultajn interesigantojn, starigu

studrondon por ili. Plej grave estas ĉiam klopodi por krei novajn esperantistojn kaj per tio novajn membrojn. La estraro klopodis starigi specialan organon por zorgi pri aranĝado de kursoj, sed ĝis nun vane, tiel ke la estraro mem devas okupi sin pri tiu laboro.

2. «Akcentado pri korespondaj kursoj kiel tre konvena maniero lerni Esperanton por ĉiu, kiu ne povas viziti kurson.» La estraro konstante akcentadas tion en cirkuleroj kaj en «Sciigoj de N.E.L.», kaj ankaŭ en leteroj al petintoj de informoj, sed ŝajnas ke la membroj ofte forgesas mencii tiun eblecon al interesigantoj. Membro, kiu ensendas mendon pri la korespondaj kurso, rajtas reteni kr. 5,00 kiel varbpremion.

3. «Starigo de lingva instanco kiu atentu pri ĉiama plialtigo de lingva kapablo inter Norvegaj esperantistoj, pri metodoj de instruado, pri lernolibroj kaj pri lingvaj problemoj rilatantaj al influoj de specialaĵoj en la Norvega lingvo kaj al la neceso krei Esperantajn esprimojn por specife Norvegaj vortoj kaj dirmanieroj.» Siatempe la estraro komisiis al la Ekzamena Komisiono funkcii ankaŭ kiel tia instanco, sed ĝiaj membroj estas tro okupitaj por pli vasta aktiveco sur tiu kampo. Eble oni devus konsideri starigon de ia Norvega Esperanto-Akademio?

4. «Uzado de Esperanto en landkunvenoj, distriktkunvenoj, klubaj kunvenoj, estraraj kunsidoj kaj en

ĉiuj aliaj Esperantaj renkontiĝoj.» En niaj landaj kongresoj ni nun jam multe uzadas Esperanton, sed kiel estas en la klubaj kunvenoj tra la lando? La klubkunvenoj estas ofte la solaj okazoj por multaj membroj praktiki la lingvon, kaj al eksteruloj strange impresas ke ni mem ne pli multe uzas nian lingvon. La celo devus esti ke en Esperantoklubo oni parolas nur Esperanton.

Ĉi tie ni ŝatus aldoni ankaŭ atentigon ke oni klopodu pri aperigo de la gazeta kurso en la lokaj gazetoj. Tio kreas intereson inter la legantoj, kaj multaj, kiuj alimaniere ne venas en kontakton kun Esperanto, tiel efektive eklernas la lingvon.

(Daŭrigota)

H. Fr.:

GERMANA INSTRUISTO EN NORVEGIO PRI LA INSTRUADO DE LA GERMANA LINGVO

En la debato ĉirkaŭ tiu problemo, kiu aktualiĝis en la naŭjara lernejo, Karl Maximilian Biehl, germana instruisto, kiu dum tri jaroj instruis en Norvegio, inter alie diras: «El miaj 32 jaroj mi dum 29 loĝis en Germanio. Mi parolis la germanan antaŭ ol mi en la gimnazio lernis ion pri la akuzativo. Troviĝas multaj miliono da germanoj, kiuj ne havas ideon pri dativo aŭ akuzativo. En Germanio oni parolas «germanan»!

Plue li diras: «Norvega lernanto devus scii, ke li ne povas lerni

perfektan germanan; scii perfektan germanan estas la tasko de la germanoj! La norvego ne bezonas koni ĉiujn eceptojn en neŭtrum. Estas interese por mi kiel germano vidi, kion norvegaj cenzoroj konsideras germana. Deklinaciaj formoj, kiujn mi uzis dum mia tuta vivo — kaj kiuj estas uzataj de 10 milionoj germanoj — estas kalkulataj kiel eraraj. Norvega junularo supozeble instruos al germanoj la germanan?»

La konata pedagogo pri germana lingvo kaj verkisto de lernolibroj *Leif Kagge* donis sekvantan ekzemplon de la nova, «piĝina» germana lingvo, kiun la norvegoj lernu en la norvega lernejo. Vidante ĉi tiun produkton eble la germanoj kaj norvegoj preferus labori por la enkonduko de *Esperanto* en la lernejo anstataŭ riski sekvantan «kaŭdervelskon»:

TYSK ER TYSK

Hr. redaktør.

Zu Lehrer Biehl.

Dank für dein Artikkell in Aftenposten 20. ds. um deutsh in die Schule hier vorrige Tagen. Das war einen Wort in recht Zeit!

Grammatikk habe wir nicht brauch für, keine in Deutschland kann grammatikk, was für soll wir lerne es? Es hat keinen Ding und sage, nur alle verstande das wir sage, das ist alle enig um auf die Schule.

Ich hat gegangen auf die Schule in zwei Jahr und lernt deutsh, aber ich hat nur wenig gut in deutsh gleichwohl. Ich kann begin-

Ferioj kun senco

Ekkonu danan filozofion kaj danan ferian vivon. Pasigu la antaŭkongresan semajnon (24.7.—31.7.71) en la feria centro

KOSMOS en Danlando.

Prelegoj kaj liberaj diskutoj pri esencaj demandoj de la vivo, i.a. pri Esperanto-problemoj. Feriado en bela naturo apud la maro. Ekskursoj al vidindaĵoj kaj historiaj lokoj. Vizitoj en danaj feriaj hejmoj, kie floras intereso pri humanismaj kaj internaciaj demandoj. Petu senpagan broŝuron ĉe Martinus-Instituto, Esperanto-Sekcio, Mariendalsvej 94—96, DK 2000, Kopenhago F., Danlando.

ne mit frehsh, sagt meiner Lehrer in deutsh, das ist ein gut Sprach vor dich. Aber nein, ich will reise zu Deutschland und lerne deutsh, und auf dritten Jahr kann ich gleich fiel als du hast hier lernt, nur ich kommen zu Deutschland, glauben du nicht?

Oslo, 30. desember. *Leif Kagge.*

Unesko-Novajoj

LENIN PRI LIBROJ KAJ BIBLIOTEKOJ

Tre modernaj estis la ideoj de V. I. Lenin pri utiligo de biblioteko. Jam en 1911 li laŭdis la Publikan Bibliotekon de New York, kiu en unu jaro servis al 1.658.376 personoj. «Fiero kaj gloro por publika biblioteko» — li skribis — «troviĝas, ne en la nombro da raraj verkoj, da eldonaĵoj de la 16-a jarcento aŭ manuskriptoj de la 10-a, kiuj tie troviĝas, sed en la ampleksa diskonigo de libroj *inter la homamasoj*, en la nombro de nove varbitaj legantoj, en la rapida kontentigo de ĉiu libro-peto, en la nombro da libroj liveritaj al hejmoj, en la nombro da infanoj allogitaj al legado kaj al ĝuado de la biblioteko . . .»

Ankaŭ post la rusa revolucio daŭris lia intereso pri diskonigo de libroj. Li esprimis deziron, ke oni povos «en la daŭro de nur unu jaro, kaj malgraŭ niaj nunaj malfacilaĵoj, doni al la amasoj ĉiujn necesajn lernolibrojn kaj ĉiujn neprajn klasikaĵojn de literaturo, kaj de modernaj scienco kaj tekniko, po du ekzempleroj por ĉiu el la 50 000 bibliotekoj kaj legejo . . .»

(Laŭ Unesko-novajoj kaj Informa Servo de UEA)

UNIVERSITATA PROGRESO EN IRLANDO

Novan pruvon pri la plirapidigo de eduka progreso en la Irlanda Respubliko provizas lastatempe subskribita kontrakto pri baldaŭ konstruado de nova universitatejo en Gaillimh, urbo en la okcidento de la Respubliko.

La Universitata Kolegio de Gaillimh, fondita en 1845, funkciis ekde 1908 kiel parto de la Nacia Universitato Irlanda. NUI estos baldaŭ disigita, kaj anstataŭe ekfunkcios tri apartaj kaj memstaraj universitatoj, en Baile Atha Cliath, Corcaigh kaj Gaillimh.

Nuntempe studas en Gaillimh 3 000 studentoj: tiu nombro duobliĝos ĝis 1980, kiam oni antaŭvidas kompletigon de la konstruprojekto. La nova tereno ampleksos 300 akreojn (120 hektarojn), kaj la fina kosto estos preskaŭ 35 milionoj da dolaroj. El tiu sumo, 2,5 milionojn havigos privataj instancoj, la ceteron la registaro.

Lingva klarigo: Kiam temas pri Irlando, multaj mapoj uzas la anglalingvajn urbanomojn anstataŭ la oficialajn, kiuj estas gael-lingvaj. Tial ni menciuj la ekvivalentojn: Gaillimh = Galway; Baile Atha Cliath = Dublin; Corcaigh = Cork.
(Redakcio, U-N.)

KOMPUTERO GUSTUMAS RIVERAKVON EN POLLANDO

Nove starigita registara komisiono, sub prezido de s-ro Zdzislaw Tomal, respondecos pri «protekto al la homa medio» en Pollando. Ĝi kunordigos tiurilatajn laborojn de diversaj ministerioj kaj prizorgos rilatojn kun internaciaj organizoj.

Plej urĝe traktendaj estas la problemoj pri polucio de akvo kaj protekto de la

natura medio ĉirkaŭ urbegoj kaj industriaj kompleksoj. Jam de kelkaj jaroj multigaj uzinoj ĉe riverbordo: ili nepre bezonas grandan akvoprovizon — sed dank al ili la riveroj fariĝas kloakoj.

Tial do projekto POL-5, kiun entreprenis la Monda Sanorganizo kiel parto de la Disvolviga Programo de UN. Kunlaboras ekspertoj el 19 sciencaj organizoj en Pollando. Dufoje ĉiun minuton tuboj en la riveroj Wisla kaj Odra ensuĉas «plenbuŝon» da akvo, kiun oni tuj analizas. Informojn pri temperaturo, malklareco, enhavo de oksigeno, ktp., oni sendas al komputero ODRA 1003 en Warszawa.

ODRA 1003 kontrolas kaj komparas la informojn: se ĝi rimarkas polucion en iu parto de la riveroj, ĝi tuj atentigas pri tio, kaj krome kalkulas kiom da akvo el kiu lago oni devos kanali en la riveron por dilui la venenitan akvon.

La 150 kunlaborantoj en projekto POL-5 estas optimismaj: en la jaro 1985 — laŭ ili — verŝajne restos en Pollando ne pli ol 70 kilometroj da venenitaj riveroj.



Han har vært formann siden . . .

a) Jeg treffer en mann og spør hvorfor han er så blek. Han svarer at *han har vært syk*. Li estis malsana. Han er det ikke lenger.

b) Jeg besøker en syk venn. *Han har vært syk* — og er det fremdeles: Li estas malsana.

Det som har vært og fremdeles er, uttrykkes på Esperanto med pre-

sens, nutid, as-formen av verbet.

Han har vært formann i klubben (— og er det fremdeles) må derfor hete:

Li estas prezidanto de la klubo.

Ak. III

Jubileoj

SIGNE KORSTVEDT 60-JARA

La 11an de Februaro la agema sekretariino de N.E.L., Signe Korstvedt, fariĝis 60-jara. Ŝi esperantistiĝis en Horten 1933 kaj dum jardekoj estis la ĝvida forto de la Esperantoklubo tie. Ŝi estis ankaŭ la motoro de la aranĝantoj de la du Norvegaj Esperanto-Kongresoj okazintaj en tiu urbo. Poste ŝi transloĝiĝis al Oslo kaj estis baldaŭ elektata en la estraron de N.E.L., kie ŝi konsciencie prizorgas la taskon de sekretario. Signe Korstvedt estas tre modesta, sed tre fervora, konvinkita esperantisto, al kies laborado ni multon ŝuldas. Okaze de la jubileo ni elkore gratulas!

C.S.-B.

CARSTEN BRYNILDSEN 50-JARA

Malnova esperantisto Carsten Brynildsen, la tradukinto de Kon-Tiki en Esperanton, fariĝos 50-jara la 13an de Marto. Ni kore gratulas!

EMIL HÅLAND 75-JARA

Instruisto Emil Håland, kredeble la unua esperantisto en Sauda, fariĝis 75-jara la 5an de Februaro. Sinceran gratulon!

SIGRID BIRCH OLSEN
70-JARA

La Delegito de Greåker, s-ino Sigrid Birch Olsen, jaron post jaro kasistino de La Urso, Sarpsborg, estos la 11an de marto 70-jara. Proksimume sametmpe ŝi estos esperantisto dum 60 jaroj. Niajn korajn gratulojn!

Nekrologoj

FORPISIS INGRID BYOM

Post longa kaj doloriga malsano forpasis en Oslo s-ino Ingrid Byom la 4an de Januaro. Ŝi estis esperantisto nur de du jaroj, sed tre fervora, kaj afabla, aminda homo. Al la familio nian sinceran kondolencon.

JULIE ŠUPICHOVA

Forpasis la 20-an de decembro 1970, en la aĝo de 86 jaroj, la ĉeĥa pioniro Julie Šupichová, kiu estas konata ankaŭ kiel aŭtorino. Ŝi havis plurajn kontaktulojn ankaŭ en Norvegujo.

TejoPUPTeatRA FESTIVALO
RIKOLTIS GRANDAN SUKCESON

Zagreb (PIF) — Inter la 5 kaj la 11 de oktobro 1970 okazis en Zagreb kaj Sisak (Jugoslavio) la 3-a Pupteatra Internacia Festivalo en Esperanto sub la aŭspicoj de UNIMA (Internacia Unuiĝo de Pupistoj). Partoprenis profesiaj kaj kvalitaj amatoraj pupteatroj el sep landoj de Eŭropo kaj Ameriko. Pro diversaj malfacilaĵoj, kvin pliaj anonciĝintaj landoj devis last-

momente rezigni pri la partoprenado. Malgraŭ tiu serioza handikapo, la 3-a PIF rikoltis grandan sukceson, kaj ĝiajn prezentaĵojn rigardis ĉirkaŭ 8.000 personoj. La ĉefan premion de la faka jurio, prezidita de la eminenta itala pupistino Maria Signorelli, ricevis la pupteatro el Konstanca (Rumanio) pro la prezentaĵo «La museto kaj la pupo» de A. Popovici. Internacia infana jurio konsistanta el infanoj el kvar landoj, flue parolantaj la mondlingvon Esperanto, donis sian preferon al la prezentaĵo de Kočiče «La scivola elefantido». Tiun spektaklon filmis la televido de Zagreb kaj kun sub-

*Bonvenon al Gotenburgo
kaj . . . al Londono!*

La urbo Gotenburgo, mondkonata havenurbo ĉe la sveda Okcidenta Marbordo, tutan 1971 festas sian 350-jaran jubileon. En la kadro de la urba jubileo ni invitas vin al sestaga restado en amika, internacia Esperanto-rondo 24.—29. julio. Atendas vin interesa, varia kaj altkvalita programo.

Ĝustatempe okazos komuna ŝipveturo al la 56:a UEA-kongreso en Londono, favorpreze aranĝota por niaj gastoj kaj aliaj esperantistoj.

INTER-Agadgrupo por Esperanto
Box 55028

S-400 53 GOTENBURGO, Svedio
Telefono: (031) 48 95 97

P.S. Mendu ankaŭ novan turistan prospekton pri Gotenburgo en Esperanto, nepre skribante rekte al: Turista Oficejo, Parkgatan 2, S-411 38 *Gotenburgo*, Svedio.

titoloj en Esperanto ĝi aperos en la normala TV-programo. La 4-a Pupteatra Festivalo okazos de la 2 ĝis la 9. oktobro 1971.

18 SAMTEMPAJ KURSOJ EN TOKIO

Tokio (TEJA) — Kiel informas la julia numero de «La Nova Tajdo», oficiala organo de Tokio Esperantista Junulara Asocio (TEJA), en Tokio funkcias 18 kursoj samtempe lanĉitaj antaŭ kelkaj monatoj. La nombro de la lernantoj estas pli ol 200. La kursojn organizis 12 junularaj grupoj de la japana ĉefurbo asociiĝintaj en la komuna organizo TEJA. Dum la lastaj jaroj sekve de sistema kaj kunordigita laboro, en TEJA aperis multaj novaj gvidantoj, el kiuj pluraj nun unuafoje havis okazon gvidi la kurson.

FERVOJISTA JUNULARO FORTIGAS

Trappes, Francio (IFEFF) — La lasta kongreso de Fervojista E-federacio (IFEFF) — okazinta en majo en Rimini (Italio), donis gravajn impulsojn por estonta agado de la fervojista Esperanto-parolanta junularo. Tio estis kvazaŭ sekvo de tre nombra ĉeesto de gejunuloj en la kongreso kaj espereble de sufiĉe riĉa junulara programo, en kiu krom la oficialaj kunvenoj kaj ekskursoj, elstaris ĉiuvesperaj diskutoj, internacia balo kaj la tradicia futbalmatĉo. Tuj post la kongreso, sub gvido de la nova gvidanto de la Junulara Sekcio de IFEFF, Johano Mével, oni ellaboris jaran laborplanon de la Sekcio. Ĝi antaŭvidas plifirmigon de la organiza strukturo, pli efikan internan kaj eksteran informadon, bonajn rilatojn kun TEJO, kaj speciale organizojn de la ĉi-vintra skisemajno kaj la junularaj aranĝoj dum la sekvanta kongreso de IFEFF, kiu okazos en majo 1971 en Maribor (Jugoslavio).

FRANCOJ AKURATAS!

Paris (JEFO) — Francaj gejunuloj ne perdas tempon: ili jam nun intense planas novajn renkontiĝojn. Por 6.—13. februaro estas fiksita skisemajno en Toussuire, en kies programo oni interalie antaŭvidas paraŝutalton sur la neĝon kun verdaj steloj. Alia aranĝo okazos kadre de la franca nacia kongreso en Lyon, 6.—12. aprilo 1971. Tie okazos junulara renkontiĝo kun speciala programo, kies kelkaj eroj estas vizito ĉe la firmao Berliet, pristudo de grupdinamiko, studenta tago, diversaj prelegoj, ekskursoj, ktp. Informojn pri ambaŭ aranĝoj donas: JEFO, 34 rue de Chabrol PARIS 10e, Francio.

«DISKO»

Mi certigas vin, karaj legantoj, ke viajn pretendojn mi ne seniluziigos dirante rekte: legu la libron Disko de nia eminenta novelisto Rosbach.

La stilo estas flua kaj facile legebla; tiu ĉi fakto kune kun la streĉa enhavo katenigos vin ĝis ĝia lasta spiro.

Rosbach majstras (Auld prave deklaris, ke li estas nia S. Maugham) la metion prezenti fantazion per efektiva kaj ekscita teksaĵo, eĉ se vi dubas, ke tiu koincida fadenaro ne estas videbla. Sed vi estas devigita ĝin imagi kaj tiu ĉi senĉesa flirto de la aŭtoro kun fantazia kaj reala mondoj interplektadas tiel, ke eĉ fakto aspektas fabela. La talentplena tekniko de Rosbach kvazaŭ konas nek limon, nek elĉerpigon.

La kvalitoj kaj talento de Johan Hammond Rosbach pruvas, ke la Esperantoliteraturo staras sur la firma bazo kaj sur la sama nivelo kun la naciaj.

Zora Heide.

Norvega Kroniko

Hamar

La Norda Stelo.

14/9-70. La unua kunveno de la aŭtuno okazis ĉe gesinjoroj Strømness.

Dezirinte bonvenon, la prezidanto, Per Engen, sciigis ke la programkomitato kunvenis jam en aŭgusto kaj tiam skizis la kunvenprogramojn de la sezono.

Venis saluto de Henriko Seppik, kiu sciigis pri elsendo de Esperanta programo de Tallin la 23an de septembro.

Venis letero de P. J. Krogstie, kiu petis pri diskonigo de la anoncita propaganda kunveno en Budor en oktobro.

Kåre Bye lerte kaj interese rakontis pri la IFEF-kongreso en Bulgario kaj montris multajn belajn bildojn.

Dum la «Lingva horeto» oni energie voĉlegis kaj tradukis el «La Mirinda eliksiro».

Ĉarman tempon oni pasigis ĉe la kafotablo de sinjorino Strømness.

5/10-70. Kunveno en Paletten.

Pro foresto de la prezidanto la sekretariino gvidis la kunvenon. Venis kelkaj cirkuleroj de NEL kiuj estis legataj.

Dum la «Lingva horeto» oni legis el «La Mirinda eliksiro», poste faris konversacion en Esperanto, gvidatan de Elise Koller.

Lotumado kaj kafotrinkado.

26/10-70. Pro diversaj aliaj aranĝoj en la urbo nur malmultaj partoprenis la kunvenon.

La prezidanto deziris bonvenon al ĉiuj kaj precipe al nia gasto de Oslo, C. Støp-Bowitz.

Støp-Bowitz rakontis pri sia interesa restado en Japanujo dum la UK en 1965 kaj montris lumbildojn. La prezidanto kore dankis pri la parolado esprimante bedaŭron pro la eta aŭskultantaro, sed esperis ke la parolinto malgraŭ tio baldaŭ revizitu nin por paroladi pri unu el siaj multaj aliaj aŭskultindaj temoj.

16/11-70. Iama membro de nia klubo, Even Haakenstad, montris al ni siajn eksterordinare belajn lumbildojn — unu serio estis de Høvringen — ĝi igis nin sopiri altmonten — la alia de la kajo en Hamar, la kajo kiun ni vidis milfoje mil, sed neniam tiel.

«Lingva horeto» kaj lotumado sekvis.

14/12-70. Zamenhofa vespero en Paletten. Ĉeestis ankaŭ kelkaj geanoj de la «Tri verdaj steloj» en Løten.

Ĉe la festotablo deziris bonvenon la prezidanto, kiu krome paroladis pri la kreinto de Esperanto donante al ni pli detalan kaj interesan bildon de li ol ni antaŭe konis.

Post komuna kantado, kafortinkado kaj interbabilado P. J. Krogstie rakontis pri sia vojaĝo al Rimini — la kongresurbo de IFEF la pasintan jaron — kaj

montris ege belajn lumbildojn.

La prezidanto dankis pro la parolado kaj Krogstie dankis pro la agrabla kunesto.

Ekino.

Oslo

5/11.70. Kiel «Vortoj por pripenso» R. Grotmål legis la poemon «Sur fervojo» de la hungara poeto Sándor Petöfi el la libro «Libero kaj amo».

Ĉefpunkto de la programo estis lumbildprelego de Per Johan Krogstie pri lia vojaĝo de Løten tra diversaj landoj en Eŭropo ĝis Rimini en Italujo por partopreni la IFEF kongreson tie. Akompanis la prelegon amaso da belaj kolorlumbildoj faritaj dum la vojaĝo kaj la kongreso.

Post la prelego ni — honore al s-ro Krogstie — komune kantis «Jen la kanto de l' vojaĝ'».

Saudo

La novembro kunveno de Mara Vento, Haugesund, okazis la 5-an. Bonvenigis la prez. Klara Dahl, direktante apartan bonvensaluton al la programulo de l'vespero, lernojestro Anders J. Velde, kies temo estis «La Kristnask-festo en la malnova tempo».

Tre interesokapte kaj amuze li rakontis pri la malnov-tempaj Kristnasko-kutimoj, pri la fest-preparoj kaj la celebrado. Tre vive li priskribis la etoson tiutempan

spicante la rakontadon per amuzaj fragmentoj. Forta aplaŭdo sekvis la plaĉan kaj ŝatatan programon.

Priparolata estis i. a. funkciigo de daŭriga studrondo kiu plialtigu la parolkapablon de la ŝtudentoj. Instrua vortludado finis la kunvenon kiu estis relative bone vizitata.

La klubo kunvenis la 9an de novembro ĉe gesinjoroj Bjerke.

«Mia poemo»n laŭtlegis ĉi tiun fojon Karen Berge, estis «La unua kanto» de Per Sivle. Pro ne ĉeesto de Ida Veka la prezidanto laŭtlegis «Kiel mi fariĝis Esperantisto» skribitan de ŝi. Ida Veka estas ankaŭ unu el la malnovaj esperantistoj de nia klubo. Ŝi komencis ekstudi nian lingvon kelkajn jarojn antaŭ ol la klubo fondiĝis. Siaj unuaj esperantaj instruistoj estas Emil Håland kaj Nicolaisen.

La cirkulero de N.E.L. por septembro laŭtlegis la sekretario kun posta pridiskuto de la enhavo. Pri la kongreso en Londono ni petos ke La Okcidenta Distrikto de N.E.L. aranĝu komunan vojaĝon tien por ni kiuj apartenas al tiu ĉi distrikto. Johan Matland rakontis pri Unesco kaj pri la malfacila internacia lingva-problemo. Inter alie li opinias ke ni en Eŭropo provu unue ekrilatiĝi kun Europa-rådet por eble tie trovi orelojn por nia lingvo.

Post kafopauso ni transiris al «La lingva duonhor» kiu temis pri traduko el la libro «Hva nu — lille mann».

A. Bjerke.

Korespondu!

Mi deziras bone lerni Esperanton per korespondado. Mi estas 18-jara gimnaziano, ŝatas motorcikli, kolektas poŝtmarkojn, interesiĝas pri literaturo, dancmuziko. Andrásy Tomás, Tigris u. 3, *Jászberény*, Hungarujo.

Mi esperas gajni novajn amikojn norvegajn. Mi aĝas 50-jara kaj interesiĝas pri ĉiuj temoj, precipe kino kaj sonbendaj aferoj. Ĉiuj respondoj bonvenaj. W. H. Shoemake, 3 Gwylta Road, Townhill, *Swansea*, S. Wales, Britujo.

38-jara bulgaro, oficisto en tabakfabriko, dez. kor. kun skandinavianoj, interŝ. kolorajn bildkartojn kaj revuojn. S-ro Jordan Pavlov, ul. Koprinarska 5, *Asenovgrad*, Bulgarujo.

S-ro Fritz Ulrich, an der Horth 45, 53 *Oberweimar*, DDR, dez. kor. komprenas la norvegan lingvon.

S-ino Jana Sencuková, Ceskych bratří 1151, *Česka Lipa*, ĈSR, des. kor. pri ĉiuj temoj, interŝ. bildkartojn pri urboj kaj pejzaĝoj.

15-jara knabo deziras korespondi kun knaboj de 15—17 jaroj. Min interesas futbalo, poŝtmarkoj, bildkartoj. Hans-Joachim Rehfeldt, 1901 *Wildberg*-Bahnhof, über Neustadt/Dosse, Germana Dem. Resp. (DDR).

29-jara edzo, bibliotekisto, deziras korespondi kun juna bibliotekisto. Inter-

eso: bibliotekoj en eksterlando. Paul J. Lareau, 1032 Orchard Street, Toledo, Ohio 43609, Usono.

15-jara knabo deziras korespondi. Mia plej kara hobbio estas birdoj. Norbert Jenrich, Augustastr. 8, 1901 *Wildberg*, Germana Dem. Resp. (DDR).

49-jara organika kemiisto deziras seriozan korespondon. Mi laboras ĉe Brita Ŝtala Korporacio. Miaj interesoj estas ampleksaj. Adrian Oates, 3, Canadian Avenue, Chester, CH2 3HG, Anglujo.

LETERVESPERO

La esperanta grupo, entute 40 gelerntantoj, en urbo Rostock aranĝos la 16-an de Marto 1971 letervesperon!

Sekretario de E-to grupo Rostock, Deutscher Kulturbund, 25 *Rostock 1*, Hermannstrato 19 (GDR).

NORSK ESPERANTO-FORBUND

(*Norvega Esperantista Ligo*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo
Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S

(*Eldonejo Esperanto A/S*)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 133.29

La redacio:

Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg.
Telefona: 54 727

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:

Boks 942, Oslo 1.

Trykt hos A. Sæther A.s - 2300 Hamar